

*Migu*

## LA POPOLA LIBERIGA ARMEO

— Ĝia Naskiĝo Kaj Kresko —

Historio pruvis, ke la formado kaj kreskado de la propraj armitaj fortoj de la ĉina popolo estis kaj estas decida faktoro en plenumo de nacia liberigo.

Kiam la Norden Ekspedicio de la Granda Revolucio estis marŝanta al triumfo en la printempo kaj somero de 1927, la Kuomintangaj reaktuloj estrataj de Ĉiang Kaj-ŝek subite perfidis la revolucion, kuniĝis kun la imperiistoj kaj la feŭdaj fortoj kaj ekigis sangan masakron al la popolo je la 12a, aprilo, 1927. La Granda Revolucio de 1925-27 suferis fiaskon.

En ĉi tiu kriza situacio, la Komunista Partio de Ĉinio, gvidata de Kamaradoj Maŭ Ze-tung kaj Ĉu Teh, alte levis la standardon de revolucio. Je la 1a de aŭgusto, 1927, Ĉu Teh, Ĉou En-laj, Ho Lung kaj Jeh Ting gvidis la unuan revolucion armitan leviĝon en Nanĉang, ĉefurbo de Kiangsi-Provinco. Ili kaptis la urbon el la manoj de la kontraŭ-revoluciuloj kaj tenis ĝin dum kvin tagoj. Tiam, nombre superate de la malamiko, la revoluciaj fortoj retiriĝis el Nanĉang kaj marŝis al Kuangtung. Sed denove ili renkontis superege fortan opozicion. La revoluciaj fortoj tial disiĝis kaj iris diversdirektojn por facil-movebleco.

Unu unuo gvidata de Ho Lung kaj Jeh Ting organizis la kamparanojn laŭlonge de la Kuangtung marbordo por armita rezisto. En oktobro, ĉi tiu grupo kaptis Hajfung kaj Lukfung kaj establis Ruĝan Armeon de laboristoj kaj kamparanoj de pli ol 10,000.

Alia unuo gvidata de Ĉu Teh retiriĝis tra Kiangsi-Provinco al Hunan, kie ĝi subtenis la armitajn leviĝojn de la tieaj kamparanoj.

En septembro, sub la gvidado de Kamarado Maŭ Ze-tung, la kamparanoj de Hunan organizis la faman Aŭtun-rikoltan Ribelon kaj okupis Pingkiang, Liling kaj kelkajn aliajn gravajn urbojn en Orienta Hunan. La fortoj de Kamarado Maŭ estis organizitaj en la 1an Divizion de la 1a Armeo de la laborista kaj kamparana Revolucia Armeo.

La du unuoj gvidataj de Kamaradoj Maŭ kaj Ĉu fine renkontiĝis de Ĉing-kangŝan-monto sur la Kiangsi-Hunana limo. Post ĉi tiu historia renkonto, la du grupoj unuiĝis por formi la 4an Ruĝan Armeon.

Sub la gvidado de Maŭ Ze-tung, ĉi tiu popola armeo tre rapide disvolvis siajn proprajn flekseblajn strategien kaj taktikojn kaj disvolvis sistemon da teorio, principoj kaj metodoj por konstrui la armeon sub la gvidado de la laborista klaso.

En 1921, la unua kongreso de reprezentantoj de la Ĉinaj Sovetaj Regionoj proklamis la lan de aŭgusto la naskiĝtago de la Popola Armeo, la tago en kiu komenciĝis la sendependa kreado de la armitaj popolaj fortoj gvidataj de la komunista partio kaj kiu malfermis novan etapon en la historio de la ĉina popolo.

Dum la Dekjara Interna Milito kiu sekvis la Nanĉang-leviĝon, la Ĉina Laborista kaj Kamparana Ruĝa Armeo establis pli ol 10 grandajn revoluciajn bazojn. Ĝi kreskis en forton de 30,000, kiu ripete frakasis la 'ekstermajn' kampanojn faritajn kontraŭ ĝi de la milionforta armeo de la Kuomintangaj reaktuloj helpataj de la imperiistoj. De oktobro, 1934 ĝis oktobro, 1935, la ĉefaj fortoj de la Ruĝa Armeo sukcese kompletigis la Longan Marŝon de 25,000 lioj (12,500 kilometroj) al norda Ŝensi, la antaŭenira bazo por rezisto kontraŭ la japana invado al Ĉinio.

Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Milito en 1937, la Ruĝa Armeo estis reorganizita en la Okavojan Armeon kaj la Novan Kvaran Armeon. Ĝi estis la ĉefa subtenilo de Ĉinio tra okjaroj da rezisto. Kvankam ekspozata al atako ambaŭ de la japanaj kaj pupaj trupoj kaj blokata de la Kuomintang, ĝi albatis 64 procentojn de la tutaj japanaj fortoj invadantaj Ĉinion kaj 94 procentojn de ĉiuj pupaj armeoj. Ĝi mortigis, vundis aŭ kaptis 1,700,000 japanajn kaj pupajn soldatojn. Ĝi konstruis regulan armeon de 930,000 homoj kun Popola Milicio de 2,200,000. Ĝi kreis Liberigitajn Regionojn kun loĝantaro de 99,500,000 en 19 provincoj kaj certigis finan venkon en la kontraŭ-japana Milito.

Kiam Ĉiang Kaj-ŝek komencis sian landskalan de Usono instigitan internan militon kontraŭ la Liberigitaj Regionoj en Julio, 1946, la Okavoj kaj Nova Kvara Armeoj estis renomataj la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En la daŭro de la Liberiga Milito, la Popola Liberiga Armeo jam forpelis el la ĉeftero de Ĉinio la Kuomintangajn reaktulojn helpatajn de la Usona imperiismo. En la kvar jaroj ĝis la 30a julio, 1950, ĝi jam forviŝis malamikajn trupojn de pli ol 8,070,000 homoj kaj ĝi mem kreskis en potencon forton de 5,000,000 homoj. Hodiaŭ, ĝi viciĝas dua nur al la potenca Sovetia Armeo kiel forto de la popolo en la lukto kontraŭ agreso kaj por daŭra paco.

Ĝi jam fariĝis alte kompetenta, disciplinita, moderna milita forto, kun alta nivelo de revolucia politika konscio, inspirita de neskuebla fido en la kaŭzo de la popolo. Ĝiaj anoj jam lernis ne



Generalo Ĉu Teh, la Ĉefkomandanto de la PLA

nur kiel batali, sed ankaŭ kiel produkti kaj lerni kaj servi la popolon en multaj flankoj.

Por plenumi la taskon liberigi Tajvan kaj Tibeton, la Popola Liberiga Armeo daŭrigas la plialtigon de sia batalefikco. La konspiro de la Usonaj imperiistoj malhelpi la Popolan Armeon repreni ĉi tiujn teritoriojn de Ĉinio nur plifortigas ĝian decidemon efektiviĝi ilian liberigon pli frue. Kun 5,000,000 homoj armitaj hodiaŭ, la Popola Liberiga Armeo decidas venkbati ĉiujn agresajn planojn de Usona imperiismo kontraŭ Ĉinio. Ĝi scias, ke venkbati ĉi tiujn imperiistajn planojn, ĝi sekurigas la pacon de Azio, kaj de la mondo; kaj pro tio ĝi ĝuos la subtenon de ĉiuj paciaj fortoj de la mondo.

## Forbatu La Invadantojn

(daŭrigo de p. 1)

Do estas tre trafaj la vortoj de Generalo Ĉu Teh, la ĉefkomandanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, en sia parolado ĉe la kontraŭinvada amaskunveno en la 1-a de aŭgusto, kaj ili ja esprimas la konfidon de la tuta ĉina popolo. Konkludante sian paroladon Generalo Ĉu Teh diris: "Fratoj! Kamaradoj! La sperto aŭ de Ĉinio aŭ de aliaj landoj pravas unu veron, tio estas: Venko nepe apartenas al la popolo. Nun estas epoko por la popolo gajni la venkon, estas epoko por la monda tendaro por paco kaj demokratio estrata de Sovetunio gajni la venkon, estas epoko por la popolo de la tuta mondo paŝo post paŝo renversi la subpremantojn kaj gajni sian venkon. Sendube ĉiuj ajn reaktuloj, ĉiuj ajn subpremantoj de la tuta mondo estos renversitaj de la popolo."

Unuĝu la popolo de tuta Ĉinio!

Liberigu Tajvan, liberigu Tibeton, liberigu la tutan Ĉinion!

Kontraŭbatalu la Usonan agreson al Tajvan kaj Koreio!

Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung, gvidanto de la ĉina popolo!

Vivu Generalo Kim Ir-sen, gvidanto de la korea popolo!

Vivu Prezidanto Ho Ĉi-ming, gvidanto de la Vietnamia popolo!

Vivu Generalisimo Stalin, gvidanto de la monda tendaro de paco kaj demokratio!

## Revolucia Heroismo

Generalo Ĉu Teh

Revolucia heroismo metas la intereson de la revolucio super ĉio alia, kaj necesigas la plej altan respondemon kaj la plej aktivan entuziasmon por la revolucio. Ĝi signifas esti la unua porti la malĝojojn de revolucio sed la lasta ĝui ĝiajn fruktojn. Ĝi signifas sindone kaj lojale entrepreni vivlongan batalon por la revolucio kaj neniam konsideri individuajn interesojn. Ĝi signifas ne nur oferi personajn interesojn al la interesoj

kaj postuloj de la revolucio, sed ankaŭ preni pluan paŝon oferi sian propran vivon sen la plej malgranda hezitato. Revolucio estas por la bono de la popolamasoj kaj de la popolamasoj mem; tial, revolucia heroismo estas nepe la heroismo de popolamasoj. La heroismo de popolamasoj estas esprimataj en du flankoj: unuflanke, ĉiuj agoj estas por la bono de la amasoj kaj ĉiuj individuaj intereso devas esti sen-

kondiĉe submetitaj al tiuj de la amasoj; aliflanke, oni kredas ke la forto de la amasoj, la kolektiva forto, estas la granda forto kiu kreis la mondon kaj historion, dum individua forto estas nur "guto en la oceano" de tiu ĉi granda forto.

El "La Heroismo de la Okavoj kaj la Nova Kvaravoja Armeoj". Trad. Li Laŭjon

# Virinaj Laborantoj En Popola Armeo

La virinaj laborantoj de la Tria Ĉina Popola Liberiga Kamp-armeo, sub la edukado kaj gvidado de la Ĉina Komunista Partio, klopodas longedaŭran kaj malfacilan lukton kaj plenumas gravan taskon por akiri la grandiozan triumfon de 1<sup>a</sup> Liberiga milito.

La laborantinoj, en la postfronta servado ampleksas 7.1% de la tuta laborantaro. Pli ol duono el ili okupas sin je kuraca kaj higiena aferoj, 10 ĝis 20% el ili laboras en la fakoj de municifabrado, provizado, propagando, edukado, literaturo kaj arto, telegrafo ktp. Krome, estas granda nombro da infanvartistinoj, politikdirektoroj, laborantinoj en amasmovado kaj ceteraj. Parto el ili elproviĝas tra la okjara kontraŭ-japana milito kaj la tri kaj duona jaroj de liberiga milito, nun kun plena lerteco portas sur sin gvidajn oficojn de sanitara departemento, hospitalo, radiostacio, kultura grupo, kaj politika fako en la armeo.

En la armeohospitaloj 2000 laborantinoj nun restas. Inter ili estas laboristinoj el fabrikoj de grandaj urboj, virinoj el kamparaj familioj,

kaj pli multe da junaj lernantinoj. Plejparto el ili ne scias kuracadon kaj posedis malaltan eduk-nivelon, sed ili penis lernadi, kunportante ĉiam librojn kaj notokajerojn. Ili surskribis la anglalingvaj nomojn de medikamentoj sur siaj brakoj por memori dum militmarŝado celante altigi sian laborpoven por adaptiĝi al facilmoza batalado. Ili sin ekzercis en kurado, barilrampado kaj transsalto de rivereto. Venkinte ĉian malhelpon de fizika limigo, ili en necesa cirkonstanco povas iri kun la armeo per rapideco de 10 kilometroj po horo. Eĉ post 100 aŭ 200 km. rapidmarŝado ili tuj laboris senripeze ĉe restejoj. Same kiel viraj laborantoj, ili transpasis montojn kaj valojn elŝavis vunditojn, sub densa malamika bombardo, flegis ilin nokte kaj tage, organizis kaj gvidis civilajn servadmentojn venki malfacilojn kaj rapide plenumi sian taskon.

Ekzemple, la modela kurac-trupestrino Li Lan-ting, malgraŭ sia sango-kraĉado persistis en sia laboro ĉe la fronto. Foje portante brankardon trans rivero, ŝi rompis al si du ripojn, tamen ŝi

persistis ĝis la finplenumo de la tasko, eltenante doloregon. El mil tiaj laborantinoj ŝi estas nur unu ekzemplo. Jen mi citas la parolon de alia kuracistino Ĉiang Nan-ping, kiu dum du sinsekvaj noktoj portis vunditojn kaj ŝi mem estis pafvundita de usonfarita aeroplano de Kuomintangbanditoj, sed post tiam ŝi ankoraŭ savis el brulanta fajro du gravevunditojn. Pri tio ŝi diris ĉe la Konferenco de Reprezentantoj de Tut-Ĉiniaj Virinoj: "Tia okazintaĵo estas ja tre ordinara inter niaj kamaradinoj, kaj mia estas nur unu el multaj."

Esperante ke la vunditoj pli frue resaniĝos, la laborantinoj donacis al ili eĉ sian noktan kovrilon dum frosta vintro, aĉetis por ili nutraĵojn per sia modesta poŝmono, lavis por ili vestojn per sia ŝapo, elportis ilin surdorse por vidi dramon, aŭ sunumi.

Pli mirinde estas sanigejestrino Vang Ĉin-ĵing, kiu ŝirmis vunditon per sia propra korpo dum bombardo kaj maŝinpafado de Kuomintangbanditaj aeroplanoj sur vojo de translokiĝo de militvunditoj.

La laborantinoj entuziasme respondis la alvokon de sanitara departemento por sangotransfluigo (transfuzio) al vunditoj. Dum la jaro 1948, la tuta kvanto de sangotransfluigo estis 970,666 ke., kies 71% estis de niaj laborantinoj.

La art-trupanoj ankaŭ persistis en sia laboro en jarlonga marŝado kaj batalado kune kun siaj viraj kamaradoj. Ili ĉiam kunportis siajn muzikilojn surdorse dum la marŝado, kaj kiam ajn

la armeo haltis por ripozo, ili tuj komencis kanti, danci kaj ludi dramon.

Sur ceteraj postenoj la laborantinoj same montris bonajn karakterojn de braveco kaj penemo. Ĉie aperis ja multaj brilantaj heroinoj. La popola heroino, direktoro de telegrafa fako Ĉen Jen ricevis jam kvar hero-ordenojn pro siaj naŭ meritoj. Maŭ Jueĵian, laborantino de municifabro, estis duagrada ruĝflago-tenantino. Cetere en politika laboro, popolamasa movado kaj financa fako, troviĝas multaj samaj kortuŝaj heroaĵoj. Multaj fordonis sian vivon nur por la popolo.

Ekzemple, kuracistino Vu Siŭ-ĵing pro prizorgo de la retiritaj vunditoj estis kaptita kaj ne humiligiĝinte antaŭ la malamiko elportante ĉian torturon oferis sian vivon; Jan Kian, kuracstrupestrino, kiam ŝi vizitis la vunditojn en profunda nokto, estis inside mortigita; Kin Jing kaj Ĉen Kie, art-trupanoj, oferis siajn vivojn dum alvoko al la malamiko sur fajrolinio; kaj multaj aliaj estis vunditaj kripligitaj, mal-saniĝintaj de troa laborado, ktp.

La laborantinoj de 1<sup>a</sup> Tria Kamp-Armeo ĉiam estas prizorgataj kaj edukataj de la Ĉina Komunista Partio, laŭdataj kaj estimataj de la tuta armeo kaj la popolamaso, kaj sekve multaj partianiĝis.

Ĉi tia sinforĝesemo kaj nobla karaktero de 1<sup>a</sup> laborantinoj de la armeo, influas multajn nove partoprenantojn en revolucio kaj instigas ilin en lernado kaj laborado, sin forĝi kaj reformi seninterrompe, por fariĝi rapide fortaj revoluciaj batalantinoj.

Nash



Politika laborantino redaktas Legajojn por batalantoj

## Ĉinaj Proverboj

1. Maĉante la blankan panon, Ne forgesu la kamparanojn!
2. Kvankam en mizero, Tamen restas espero.
3. Laboras kiel tigro tre vige, Dormas do kiel ŝtono trankvile.
4. Semis pizon, rikoltos pizon; Semis rizon, rikoltos rizon.
5. Estas ja malgranda la pasero, Tamen en ĝi troviĝas ĉia viscerio.
6. Troviĝas neniu melono cirkla absolute; Troviĝas neniu homo bona entute.
7. Gefratoj interbataladas, La malamiko fine invadas.
8. Fratoj laboras diligente en unu koro, Eĉ la koto antaŭ hejmdomo fariĝus oro.

trad. Ly Moje

## Bilda Gazeto de Nova Ĉinio

Je la 20a lastmonate eldoniĝis en Pekino monata bilda gazeto titolita Popola Bilda Gazeto. Ĝi estas oktava formate kaj la unua numero ampleksas 60 paĝojn krom la kovriloj. Ĝiaj ĉefaj enhavoj estas fotografiaĵoj, pentraĵoj, artikoloj kaj komentarioj pri diversaj flankoj de ĉina konstruado kaj internaciaj okazaĵoj.



## Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj bonvenataj, kondiĉe ke ili ne estos malice kripligitaj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj oni rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) Sendi al ni 4 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio el nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tutmondo!

## Vundita batalanto efektivigis sian deziron

Iutagon dum la Kontraŭ-Japana Milito, la armea postfronta hospitalo en la antaŭurbo de Jenan, ricevis freŝan grupon de vunditaj soldatoj. Sur unu el la brankardoj estis serioze vundita soldato kun kuglo en la abdomeno. Li daŭre deliradis kaj ĝemadis. Lia stato estis tro serioza por operaci, kaj la kuracistoj jam perdis ĉiujn esperojn por lin elŝavi el la danĝero.

Subite, la soldato malfermis siajn okulojn kaj ekkriis: "Kamarado Maŭ Ze-tung, mi treege deziras ekvidi vin nur por unu fojo. Ĝis nun mi partoprenis revolucion jam sep jarojn, sed en ĉiuj tiuj jaroj da batalo mi neniam trovis ian ajn okazon por vidi vin."

Kelkaj flegistinoj venis por lin kvietigi. Unu el ili diris milde:

"Kamarado, vi devas memori: ke K-do Maŭ Ze-tung ja estas tro okupata. Eble ne estas facile por li forlasi sian laboron kaj veni ĉi tien por viziti vin."

"Mi scias, mi scias," diris la soldato, profunde ĝemante. "Multaj vivoj dependas de li, kaj kiel li povas forlasi sian laboron? Tamen se nur mi povus foje lin vidi, estus multe pli facile morti."

Li ree falis en duonkonseion. De tempo al tempo li ĉesigis siajn ĝemadojn kaj ekvokis la nomon de Maŭ Ze-tung. Ĉar la vundita soldato tiel avidis ekvidi sian gvidanton antaŭ morto, la flegistinoj decidis ke estas ilia devo raporti la aferon al Prezidento Maŭ telefone. Prezidento Maŭ persone ricevis la telefonan vokon kaj demandis detale pri la stato de la soldato, esprimante saman intiman prizorgon kiel membro el la propra familio de la soldato. Li tuj surmetis

sian ĉapon, surĉevaliĝis kaj ekgalopis al la vundito.

Ĉiuj vunditoj supren rigardis kun miro de duona dubo kaj granda ĝojo, kiam Prezidento Maŭ eniris en la ĉambron kie kuŝis la soldato mortanta.

Iu flegistino diris:

"Jen K-do Maŭ Ze-tung venas vin vidi!"

La soldato malfermis siajn okulojn kaj rekonis sian amatan gvidanton. Lia buŝo tordiĝis en gaja rideo kaj penis ion diri, sed li estis jam tro malforta por fari sian voĉon aŭdebla. Eluzante sian lastan forton li etendis sian manon al Prezidento Maŭ.

Prezidento Maŭ ekprenis la etenditan manon en ambaŭ la siajn. Kun larmoj brilantaj en la okuloj li sia klinis kaj diris:

"Vi estas unu el niaj grandaj kaj gloraj kamaradoj. Mi neniam forgesos vin..."

Post kelkaj minutoj, la soldato mortis kun sia mano ankoraŭ pretenata en tiuj de Prezidento Maŭ. Eĉ sur lia vizaĝo postmorta restis la mieno paca kaj kontenta.

Poste Prezidento Maŭ vizitis ĉiujn ĉambrojn kaj babiladis kun la vunditaj soldatoj, esplorante la prizorgadon kiun ili ricevas kaj demandante la opiniojn de la paciento, pri diversaj aferoj.

Dum tagoj post la memorebla vizito de Prezidento Maŭ, la vunditaj batalantoj interparolis nenion alian. Unu el ili esprimis la sentojn de ĉiuj, kiam li diris:

"K-do Maŭ Ze-tung prizorgas nin ĉiufankel!"

Trad. Li Laŭjon El "Rakontoj pri Maŭ Ze-tung?"

## ĈIAM ANTAŬEN.

-- Rakonto pri Kultura Lernado en Ĉina Popola Liberiga Armeo --

Sung Venmaŭ

La ĉambro estis helege prilumata de elektra lampo. La partianoj de la dua grupo kunsidis. Ĉaŭ Vencing, la gvidanto de la grupeto ekstarigis kun notlibro en mano kaj parolis serioze: "Gravan aferon mi komunikas al vi: t.e. lerni kulturon."<sup>(1)</sup> La superaj aŭtoritatoj jam plurfoje emfazis, ke oni distastigu la respondecan sistemon de instruado kaj lernado. Sed nia grupo ankoraŭ pagis nenian atenton. Ĉifoje la partia ĉelo alvokas, ke ĉiuj analfabetaj partianoj estu respondecaj lernantoj kaj ĉiuj instruistoj estu respondecaj instruantoj. Tion dirinte li promenis rigardon tra la ĉeestantoj kaj kompletigis per la vortoj de la regimento politika komisaro: "Komunisto devas esti modelo ĉiukaze! Estu heroo sur batalkampoj kaj modelo en lernado. Kiuj ne ellernos 700 ideografojn en tiu ĉi jaro, tiuj estos konsiderataj kiel postrestantaj elementoj."

"Do kiel komencu?" iu proponis. "Unue ni dividu la membrojn de nia grupo en du partojn: kiuj respondos instrui kaj kiuj respondos lerni."

"Ne estas tia simpla afero," diris alia. "Oni devas bone prepari. Ni partianoj donu ekzemplojn al la aliaj. Ekzemple, mi mem konas nur 400 ideografojn kaj estas ankoraŭ malproksime de la fiksita celo. Precipe nia grupestro konas nur pli ol 50, enkalkulante sian nomon. Li devas ankoraŭ multe klopodil!"

Ĉiuj ĵetis malgraŭvole rigardon al Li Kiŝeng, la grupestro. Li iom palpebrumis. Lia dika korpo restis senmova kaj la nigra vizago brilis. Nur post longa momento li komencis, kiel li iam ĵuris antaŭ batalo: "Vidu, kamaradoj, mi klopodos. Mi fermos la vortojn unu post alia en la memoro, kiel mi katenis la militkaptitojn. Mi simple esperas, ke oni min bone instruu."

\* \* \*

Li Kiŝeng estis veterana grupestro. Ne necesis enketi pri lia pasinteco, la du hero-medaloj antaŭ lia brusto estis sufiĉa atesto, ke li estas lerta batalanto. Tamen lia kultura nivelo estis tre malalta. Kiel la proverbo diras, da vorto granda kiel buŝelo li ne konis duonon de ŝeno.<sup>(2)</sup> Antaŭe li naskiĝis en malriĉa familio kaj ne havis la eblon viziti lernejon. Li soldatiĝis por liberigi kaj venĝi sin. Kiam la interparolo tuŝis batalon, li jam ebrigiĝis de ĝojego. Se vi volus lerni al li la leg-kaj-skribarton, li respondis malentuziasme: "Ĉu estas rafinebla denaska krudulo? Kion

plian vi postulus de soldato ol batali bone?" Dum multaj jaroj li sukcesis ellerni ĉirkaŭ 50 ideografojn enkalkulante sian nomon.

En la novjaro, rondiris onidiro en la kompanio, ke oni devas elimini en 1950 ĉiujn analfabetojn, kiuj konas malpli ol 700 ideografojn. La kamaradoj forte entuziasmiĝis, sed Li Kiŝeng jam anticipis ĝian malfacilecon. "Ĉu eble? 700 ideografojn, ĉe kalkuli bezonas ne mallongan tempon. Mi ne sukcesus ellerni ĉe ĝis la simio-jaro!"<sup>(3)</sup> Novjaro pasis, la superaj aŭtoritatoj farigis pli rigora pri la kultura lernado. Al la kompanio kultur-instruisto estis sendita. Oni nomvokis ĉe la komenco de la lernohoro kaj asignis ekzercojn post la leciono. Vi devis lerni ĉe nevole, ĉar oni ĉiam vin antaŭen trenis.

Tiu nove alsendita kultur-instruisto neniam lasis vin trankvila. Li ĉagrenetis vin de tempo al tempo. En lia ĉesto Li Kiŝeng suferis ne malmulte. Foje, la instruisto venis kun letero kaj diris gaje al li: "Grupestro, hejma letero por vi!"

Nenion dirante, Li Kiŝeng etendis sian manon por la letero, sed la kultur-instruisto diris tute serioze: "Ĉu vi volas la leteron? Jen Kondiĉo. Legu ĝin al mi."

"Vi ja trudas al mi neblaĵon!"

"Ne, se vi ne konas, mi instruos vin."

Li Kiŝeng forte embarasiĝis, sed akceptis la kondiĉon malgraŭvole. Li malklare tralegis la leteron sed komprenis nenion el ĝia enhavo. Poste li pasigis duonhoron en lernado sub la direkto de la instruisto. Tiel finiĝis la farso. Li Kiŝeng diris forviŝante ŝviton: "Ne plu min turmentu, mi jam bone lernas."

Post la grupeta kunsido de tiu vespero, granda ŝono pezis sur lia koro: Kiel lerni? Kiu estu la respondeca instruanto. Ĝi okupis lian menson en la tago kaj la sonĝon en la nokto.

\* \* \*

La sekvanta tago estis vendredo. Ĉaŭ Vencing, la partia gvidanto de la grupeto pensis en si: "Estas tempo protokoli al la ĉefa sekretario. Sed la grupestro ankoraŭ ne trovis respondecan instruanton. Estas facile diri, ke la partianoj estu modeloj, sed mi timas, ke ĉifoje nia grupo ree estos la malmodeloj!" La nomoj de ĉiuj grupanoj, kiuj havis pli altan kulturenivelon, trakuris lian menson unu post alia. Laŭ<sup>(4)</sup> Vang estas sudlandano kaj havas nekularan elparoladon. Niŭ Ŝlin estas

ekonomia komitatano en la soldata komitato, kaj tempo mankas al li. Post longa pripenso, li ekmemoris Ĉang Kie kaj tuj rapidis al li.

Ĉang Kie estis helpanta kamparanon kolekti fekajon. Ĉaŭ iris al li kaj ekpartoprenis en la laboron alparolante: "Ĉang Kie, vi estas partiano ankaŭ. Laŭ via opinio, ni kiel komencu la kultur-lernadon? Mi vidas, ke nia grupestro postrestas. Vi havas pli altan kulturenivelon kaj delonge vivas kune kun li. Ĉu vi akceptos la respondecon instrui lin? Nun li havas deziron bone lerni."

"Laŭ Ĉaŭ, kvankam vi estas gvidanto de nia grupeto, sed vi ne bone esploris la laboron." Parolante, Ĉang Kie formetis la ŝovelilon, elprenis paperon el sia poŝo kaj donis al li. "Vi malfruas."

Ĉaŭ disfalis la paperon. Ĝi estis kontrakto de respondeca instruado kaj respondeca lernado en tre neta skribo.

Respondante al la advoko de la superaj aŭtoritatoj por efektiviĝi la jarplanon elimini ĉiujn analfabetojn, kiuj konas malpli ol 700 ideografojn, ni subskribas la jenan kontrakton.

En la jaro 1948 prezoj en la parto de Ĉinio sub Kuomintanga regado altiĝis ĝis 7,730,000 fojoj pli ol sia antaŭmilita nivelo. La tuta kvanto de cirkulantaj bankbiletoj en la Kuomintanga regiono atingis \$300,000,000 milionojn dum tiu en 1937 estis nur \$1,400 miliono.

Ne nur la Kuomintangaj reakciuloj presis senvvaloran paper-monon kiel rimedo por ekspluati la ĉinan popolon, ankaŭ la japanaj okupantaj trupoj alprenis tiun ĉi metodon por elĉerpi ĉinan nacian riĉaĵon al japana trezorejo.

En 1948 la Kuomintanga registaro retiris ĉiujn bankbiletojn tiam en cirkulado kaj eldonis novan paper-monon nomitan *oran juan'on*. Ĝi eldonis \$200 milionojn da novaj bank-biletoj, por interŝanĝi la malnovajn mon-biletojn je la proporcio unu kontraŭ 3 milionoj. Tamen, ĉirkaŭ \$7,946,000 milionoj (oraj juan'oj) estis eldonitaj je la tempo de liberigo de Ŝanhajo. Dum la mallonga tempo de okmonata vivo de *ora juan'o*, prezoj altiĝis 10,000,000 oble.

Ĉiang Kaj-ŝek'a reĝimo komencis ankoraŭ alian paper-monon en Ĉankino kaj Kantono dum somero de 1949. Tiu ĉi estis nomata bankbileto de argenta dolaro. Eĉ dum sia preparado por forkuri el la kontinenta parto de Ĉinio la reakciuloj ne malatentis sian laŭsisteman rabadon de la popolo.

## La Procedo de Stabiligo.

Kiam la Centra Popola Registaro estis fondita en oktobro de la jaro 1949, ĝi tuj zorgis por haltigi la inflacion. La deficito de nia registaro en 1949 estis ĉirkaŭ 60 procentoj de la elspezoj, kiuj estis la rekta kaŭzo de la kvar pligrandaj prezo-fluktuoj dum tiu jaro. La budĝeto por 1950 anoncita en decembro, faris kondiĉojn por malaltiĝi tiun ĉi deficiton ĝis 18.7 procentoj.

En marto la registaro ekfektivigis detalan planon por alcentrigi la kontrolon de financo kaj ekonomio, kaj laŭgrade ekvilibris ŝtat-enspezojn kaj elspezojn, ekvilibris la provizadon de esencaj komercaĵoj tra la tuta lando, kaj ekvilibris la rivejojn kaj pagojn

Plano:

1. Ni kunligos la lernatajn materialojn kun la ĉiutaga laboro kaj profitos ĉiujn okazojn por lernado;

2. Tri ideografojn estos lernitaj ĉiutage ĝis oni povos bone skribi, elparoli, kompreni kaj uzi ilin;

3. Vi estas instruanto kaj mi estas lernanto, dum la lernado, mi respektos vin kaj obeos vian instrukcion;

4. Vi estas respondeca lernanto kaj mi, respondeca instruanto. Mi instruos kun tuta zorgo kaj ne neglektos mian devon;

5. Ni ambaŭ observos la disciplinojn de lernado kaj kontrolos unu alies laboron. Kiu rompas la kontrakton, submetos sin volonte al la kritiko de la grupo kaj la partio.

Respondeca instruanto: Ĉang Kie.

Respondeca lernanto: Li Kiŝeng.

Ĝin finleginte, Ĉaŭ diris kun rideto: "Tuj submetu ĝin al la grupeta kunveno. Nun ĉio estas solvita. Jen ni havas nian grupestron kiel gvidanton, la kultur-lernado de nia grupo certe prosperos kiel la aliaj laboroj."

\* \* \*

Dum la tagmeza ripozo, iuj batalantoj okupis sin je notkopiado, iuj babiladis inter si kaj aliaj ludis per kartoj..... Li Kiŝeng kliniĝis super la fenestra sojlo kaj ekzercis sin en skribado. Lia dika mano kaptis spasmne plumon kaj skribaĉis tiel penegge, ke lia torso moviĝis tien kaj reen. La frunto estis kovrita de ŝvito kiel malseka pafilkapo. Lia respondeca instruanto, Ĉang Kie

## KIEL ĈINIO

de la banko. Per tiuj ĉi tri ekvilibroj la registaro ebligas la ĉesigon de plua eldono de bankbiletoj.


La primara faktoro en haltigo de inflacio estis ekvilibro de la nacia budĝeto. Por akiri tiun ĉi rezultaton la registaraj elspezoj estis malaltigitaj ĝis minimumo. La registaro ankaŭ komencis landskalan kampanjon por starigi inventaron de ĉiuj Kuomintangaj magazenoj por reakiri neenlistigitajn kaj forgesitajn materialojn. Tamen, la plej grava faktoro en ekvilibro de la budĝeto estis enkonduko de unuigita kaj efika sistemo de impost-kolektado. Antaŭe granda proporcio de imposto eniris en la poŝon de la kolektistoj, Hodiaŭ ĉi tia granda elflu-perdo de la registara imposto jam estas ŝtopita.

La impost-kolektada programo estas tiel sukcese plenumita en tiu ĉi printempo, ke farigis eble malpliigi la procenton de gren-imposto. Metodoj de kolektado de la urba imposto estos ankaŭ alĝustigitaj baldaŭ por malpezigi la ŝarĝon de diversaj kategorioj de komercistoj.

La dua faktoro en haltigo de inflacio estis ekvilibro de landskala provizado de tiaj esencaj komercaĵoj kiaj greno, kotono, ŝtofo, karbo kaj salo. Tiel la registaro finis la spekulacion kaj akaparon, kiuj kaŭzis lokajn aŭ ĉe tutlandajn prez-fluktuojn. La prezoj en ĉiuj partoj de la lando nun alproksimiĝas al komuna nivelo.

Sub la Kuomintanga regado, Ĉinio ĉiam importis grandan kvanton da greno ĉiujare, dum la ŝanhaja kaj kantona regionoj preskaŭ tute dependis de importato. Fakte, tamen, la lando kreskigas pli ol sufiĉe da greno por provizi sian propran bezonon, la sola problemo estis transporto. Antaŭe la transporto de greno estis en la manoj de privataj komercistoj, kiuj pripensis nur pri sia propra profito, sed ne la helpo al nutraj-mankantaj regionoj aŭ stabiligo de prezoj.

Ĉijare aferoj tute diferencigas. La registaro prenis la monumentan taskon ekvilibrigi grenprovizon tra la tuta



La batalantoj legas murgazeton redaktitan de ili mem

ŝtelrigardis zorgoplene post lia dorso murmurante: "La grupestro ne estas stultulo. Antaŭ du jaroj, kiam mi nove soldatiĝis, li instruis min je pafado kaj skermado. Kunportante grenadon li evitis malamikaĵajn kuglojn rapidmove kiel ezoketo. Li manipulas infanterian pafilon kaj maŝinpafilon same lerte. Estas nekredeble, ke tricola plumo tiom ŝvitigas lin."

Vespere Ĉang Kie kontrolis la rezultaton de lia lernado. Kvankam la skribitaj de li ideografoj ne estis en egala granda kaj liniigis zigzage, tamen estis rekoneblaj kaj mankis al ili nenio. Estis evidente, ke li faris tion kun tuta zorgo. Ĉang Kie kuraĝigis lin: "Ne malbone. Grupestro, diru, ne estas malfacila tasko, ĉu?"

"Ne malfacile! Ĉu komunisto povus diri 'malfacile'?" en liaj okuloj brilis lumo de kontento.

"Laŭ mia sperto, por decidema lernanto nenio estas malfacila. Kiam mi komencis lerni de vi la eksplod-arton, ĉu mi ne estis same mallerta kiel vi nun en kultur-lernado?"

"Ne devigiĝu tro malproksimen. Eĉ la militarto ne povas iri sen kulturo. Ĝi kaze vi devas altigi mian kulturnivelon."

Ĉang Kie respondis ridante: "Kompreneble. Laŭ militdisciplino vi estas grupestro kaj mi simpla soldato, mi obeos vin; en kultura lernado, mi estas instruisto kaj vi lernanto, ĉu! se vi ne bone lernas, puno vin atendas!"

Li Kiŝeng malfermegis sian buŝon je ridi.

Tempo pasis rapide, estis en aprilo. La trupoj komencis produktadon. Ĉiu batalanto skribis mem-verkitan *rapidrakton*<sup>(3)</sup> sur sia vektro, ŝovelilo kaj aliaj iloj, montrante sautempe sian ardan amon al produktado kaj la atingiĝon de sia lernado. Li Kiŝeng rigardis kun envio. Li longe cerbumis, sed ne sukcesis verki *rapidrakton*, li fine skribis kun ekstrema peno kelkajn grandajn ideografojn sur la ligna ramo<sup>(4)</sup>: "Bonan aŭguron al la unua pelotono de la laborkomenco!" Kiuj vidis ilin, tiuj nepre ridis.

La trupo viciĝis en longa kolono, ke oni povis vidi nek la kapon nek la finon. Ligna ramo dancis sur la digo, feraj ŝoveliloj ŝvingiĝis en la aero. La terportistoj iradis tien reen kiel glitbobenoj. Inter la amaso Li Kiŝeng laboris senripoze. Ĝus formetinte la ŝovelilon, li jam ekprenis la vektro. Sur lia brako estis skribitaj kvar ideografoj: fosi riveron, ripari digon. La blua inko jam malklarigis pro la ŝvito, sed li daŭrigis rigardi al ili de tempo al tempo.

Trumpeto disanoncis laborfinon. Li Kiŝeng kaŭris sub arbeto kaj ekzercis sin en skribado. Iu frapetis sur lia kapo per fingro. Li volis protesti. Sed turnante sian kapon li rimarkis la regimentan politikan komisararon, li konfuziĝis kaj ne sciis kion diri.

La politika komisararo parolis al li: "Li Kiŝeng, oni diras, ke vi bone progresas en la kultura lernado, montru al mi vian kajeron de novaj vortoj."

"Kiu diras! Mi lernis nur 300-400 ideografojn dum la lastaj kvar monatoj. Kelkiu en mia kompanio jam lernis pli ol 500!" diris Li Kiŝeng transdonante sian kajeron al la politika komisararo. "Politika komisararo, kiam vi trarigardos ĝin, bonvolu doni al mi kritikon."

La politika komisararo malseketis sian fingron per salivo kaj foliumis la kajeron. Komence la ideografoj ŝajnis rampantaj muŝoj, meze ili similis al papilioj desegnitaj de knabineto, sed fine ili ja aspektis korekte kaj viciĝis en rektaj linioj.

"Bone, tre bone! laŭdis la politika komisararo ĝin trafoluminte. "Ĉiam lernu pene kaj vi baldaŭ ricevos medalon por lernomodelo!" Li elprenis fontplumon kaj skribis sur la kajero de Li Kiŝeng:

"Prezidanto Maŭ diris: senkultura armeo estas stulta armeo."

Elĉinigi S.J. Zec.

(1) Parolmaniero en la PLA kun la signifo: "lerni legi kaj skribi."

(2) 1 Ĉina buŝelo = 1 dekalitro, 1 ŝeno = 1 litro.

(3) En antikva Ĉinio oni nomis la jarojn per kombino de dek 'kan', i.e. trunkoj, kaj dek du 'ĉi' i.e. branĉoj. Tiel post ĉiuj 60 jaroj vivas la same nomata jaro. Poste la popoloj rigardis la 12 'ĉi' kiel simbolojn de 12 bestoj, kaj nomis la jarojn per tiuj

bestoj. Tiu kutimo ankoraŭ ekzistas inter la kamparanoj. Laŭ tiu sistemo 1950 estas tigro-jaro kaj simio-jaro estos 1956.

(4) Karesa vorto metita antaŭ la nomo de intimo.

(5) Speco de popola muziko, ĝenerale uzata en operoj.

(6) Peza ilo por batfirmigi teron.



Li serioze lernas Ĉang Sin-ju

## KONKERIS INFLACION

Jang Pej-ŝin

lando. Kvankam la tasko envolvus grand-skalan mobilizon de transportaj rimedoj, enhavantaj fer-vojojn, enlandan ŝiparon, ŝarĝaŭtojn, bruttrenatajn ĉarojn kaj homajn portantojn, ĝi jam tiel bone efektiviĝis, ke tre rimarkinda estas la efiko sur gren-merkatoj.

La tria faktoro en haltigo de inflacio estis ekvilibriĝo de monricevoj kaj pagoj manipulataj tra la ŝtataj bankinstitucioj. La Popola Banko de Ĉinio ludas gravan rolon rilate al reguligo de la kvanto de mono en cirkulado per sia kredita sistemo. Ŝtataj bankoj ankaŭ pretas meti siajn fondusojn je la disono de la Ministerio de Financo en malfacilaj okazoj, kiam necesas. Tio estas alia kaŭzo kial la registaro ne bezonas eldoni pliajn bankbiletojn de post la 1-a de marto, spite de sia granda kvanto da investoj en rekonstruado. Ŝtataj komercaj kompanioj kaj kooperativoj, kiuj nun manipulas siajn negocojn tra ŝtataj bankoj, ankaŭ havas stabiligan influon sur la merkato per efektiviĝo de registar-reguligata aĉeto kaj vendo.

Per akiro de tiuj ĉi tri ekvilibroj—la ekvilibro de budĝeto, la ekvilibro de la provizado de esencaj komercaĵoj, kaj la ekvilibro de monricevoj kaj pagoj—estis eble por la registaro haltigi subite la 12-jaran inflacion.

### La Rezultatoj de Stabiligo

La finiĝo de inflacio tuj sin elmontris en malaltiĝo de komercaĵaj prezoj tra la tuta lando. Tio ĉi estis klare montrata en la statistiko kompilita de la Popola Banko de Ĉinio sur la bazo de 80 diversaj komercaĵoj. Konsiderante la prezojn je 23, februaro, 1950 kiel 100, prezindicoj por diversaj, pligrandaj arboj estis kiel jenaj en 10, majo:

| Urbo                | Pordejala Prezindico |
|---------------------|----------------------|
| Kantono             | 79.6                 |
| Pekino              | 76.2                 |
| Tienzino            | 75.0                 |
| Ŝanhajo             | 74.8                 |
| Hankou              | 66.6                 |
| Ĝungking            | 53.3                 |
| Sian                | 50.2                 |
| Tutlanda mez nombro | 71.2                 |

La supra tabelo ankaŭ indikas la tendencojn de prezegaligo tra ĉiuj partoj de la lando. Prezoj en la nove liberigitaj Ĉinkino kaj Siano estis multe pli altaj ol en aliaj lokoj en februaro pro manko de komercaĵoj. Tamen, pli ol du monatoj poste, prezoj en tiuj ĉi urboj proksimiĝis al tiuj de la pli frue liberigitaj regionoj.

Kiam la prezoj malaltiĝis, interezo de bankpruntoj malpliĝis abrupte. Dum la periodo de ora *ĵuan*, kiam la financa krizo de la Kuomintanga registaro estis ĉe sia zenito, procento altiĝis tiel multe kiel 120 procentoj po tago, alivorte, se vi pruntprenis \$100 matene, vi devis repagi la sumon per \$220 posttagmeze. La templimoj de pruntoj ĉiam mallongiĝis, eĉ ĝis duono da tago. Hodiaŭ pruntoj estis ne plu kalkulitaj potage, sed pomonate. La procentaĵoj de la pruntadoj el privataj bankoj en Ŝanhajo je la 28a de februaro estis 42 procentoj kaj je la 18a de majo estis 3 procentoj. La interezo de la pruntadoj de la Popola Banko de Ĉinio estas ankoraŭ pli malaltaj ol tiuj de la privataj bankoj.

Kiam la inflacio venis al la fino, konfido al la popola mono plialtiĝis. Sub la regado de Ĉiang, Kuomintanga paper-mono fakte perdis sian funkcion kiel perilo de intersanĝo kaj el la merkato estis forpelita de oro, argento kaj fremdaj bankbiletoj.

La nove fondita Centra Popola Reg-

istaro tuj kontraŭstarigis antaŭ la grandega tasko establi legan monon. Kiam la aĉetpovo de la popola mono firme leviĝis, la sinteno de la popolo al la paper-mono rimarkinde ŝanĝiĝis. Inter la fino de februaro kaj la 11an de majo, la prezoj de oro en diversaj urboj falis 16 ĝis 23 procentoj. Dum la sama periodo, la prezoj de argento malleviĝis inter 31 kaj 47 procentoj en diversaj lokoj. La kurzoj de eksterlandaj monoj ankaŭ grade malaltiĝis. Pro tiu ĉi disvolviĝo, homoj nun estas oferantaj sian posedaĵon de fremda mono al la Popola Banko de Ĉinio en skalo senprecedenca lasttempe.

En la daŭro de 12 jaroj disvolviĝis en la ĉina komparo var-interŝanĝa sistemo, en kelkaj okazoj rizo kaj salo fariĝis la ĝeneralaĵa perilo de intersanĝo. Estis tre malfacilege por paper-mono penetri komparon. Sed hodiaŭ la situacio jam tute ŝanĝiĝis. La komparanoj lernas ke estas pli konvene tenadi siajn ricajojn en paper-mono ol en komercaĵoj aŭ argentaj moneroj.

Alia fenomeno kaŭzita de la monstabiligo estas rapida pligrandiĝo de deponoj en bankoj. Tio estas plua reflekto de ĝenerale kreskanta konfido al la popola mono.

La kvanto de deponoj konstante alproksimiĝis al la antaŭmilita nivelo, dum la tuta kvanto de deponoj en modernaj kaj malnovtipaj privataj bankoj estas du- ĝis tri-oble la kvanto de mono en cirkulado.

La rapideco de moncirkulado ankaŭ malaltiĝis. Antaŭe tre ofte iu ĉeko iris de mano al mano trifoje ĉiutage. Nun la meznombra semajna cirkuladrapideco de ĉekoj malaltiĝis kiel jene:

|                     |                        |
|---------------------|------------------------|
| Januaro             | 1.89 fojojn ĉiusemajne |
| Februaro            | 2.49 " "               |
| Marto               | 2.08 " "               |
| Aprilo (3a semajno) | 0.26 " "               |
| Aprilo (4a semajno) | 0.31 " "               |

Pro la sanaj disvolviĝoj en la financa sfero, la bankoj nun havas grandan kvanton da kontanta mono por investi en la landa rekonstruado. Tiu ĉi fenomeno mem helpas plue stabiligi ekonomion de Ĉinio.

Ĉiuj superdiritaj faktoroj kune kondukas al la sekvantaj konkludoj: Inflacio jam estis haltigita en Ĉinio. La aĉetpovo de la popola mono konsiderinde plialtiĝis en ambaŭ hejmlanda kaj eksterlanda merkatoj. La ĉina popolo nun havas solidan ekonomian fundamenton, sur kiu ili povas konstrui sian novan vivon.

Kvankam la reakcia Kuomintanga registaro penadis senespece stabiligi sian ekonomion en la lastaj 12 jaroj, ĝi malsukcesis entute, kaj eĉ grandega provizo de amerika oro ne povis apogi la kolapsantan ekonomian sistemon.

Nur novdemokrata registaro de la popolo, registaro plene subtenata de la granda amaso de loĝantaro povis fini la ekonomian kaŝon, en kiu Ĉiang Kaj-ŝek enprofundigis la landon. Do, tio estas ne nur ekonomia venko sed ankaŭ venko kun granda politika signifo.

Iom mallongige tradukis: HOWENS.



## Hontinda Fiasko

Movado<sup>(1)</sup>

Fripono finfine forĵetas ridŝajnon,  
Kaj de la rabisto nudigas animo,  
Hieraŭ li diris: alies internan aferon ni ne interferos,  
Hodiaŭ Korean popolon atakas jam en malproksimo.

En la pasintec' la rabisto sin kaŝis ankoraŭ post masko,  
Kaj en Filipinoj, Greklando, Ĉinio buĉadis nur per la agentoj,  
Sed nun li jam montras sin sur la scenejo senmaske,  
La monstro abomena kun lupaj ungegoj kaj dentoj.

Jen li municion, provizon, militkonsilantojn alsendas,  
Jen li mobilizas la fortojn aeran kaj maran per urĝa dekreto,  
Li anglojn kaj aŭstralianojn, fidelajn helpmanojn, ordonas,  
Kuniri masakri la pacaŭ popolon en fora landeto.

—Ĝi estas en la orienta duonsfero, vi—en okcidenta,  
Teritoriojn viajn apartigas ja la vasta Pacifiko,  
Nun vi invadas Koreion kaj bombardis Koreion,  
Ĉar ekminacas vian 'sekurecon' tiu fora respubliko!'

Rabisto nudigas jam sian animon  
Kaj Hitler revivas per fremdaj kadavroj—  
Ĉu Truman, ĉu Dulles, ĉu Johnson, MacArthur—  
Ja ĉiam li mem, krom la etaj lipharoj.

Sed la batalantoj koreaj sentimaj  
Disrompas la sonĝon de la agresulo.  
—Pjongĵang okupos ni jam en tri tagoj—  
Malfeliĉe la kvaran jam falis Seulo!

Estas vi, Dulles,  
Kiu enrampis nur antaŭ nelonge tranĉejon de l'fronto,  
Kun teleskopo en man' fanfaronis super-landokarte,  
Fuĝas hodiaŭ kun vost' subtitrita, kovrita de honto;

Kaj vi, MacArthur,  
Kiu ĵus flugis al front' por direkti bombardon persone,  
Krias hodiaŭ per akra falset' hipokrite  
—Por humanec', humaneco al militkaptitoj Usonaj;

Kaj vi, militkonsilantoj,  
Kiu ĵe la civiluloj senkulpaj direktis masakron,  
Nun forlasinte vagonojn sin savas naĝante  
Kiel ĉasataj hundaĉoj, forgesas ĉe sian podagron;

Estas vi, Acheson, Truman,  
Kiu ĵe pretendis engluti Koreon sen peno  
Tamen hodiaŭ vekite ektravas kun miro  
Ke ĉe l'malfronto kaj fronto boligas geheno:

Tiu nuligas la semajnofinan ferion  
Kaj la alia forlasas tuj la gaŭfokorton,  
Tiu ankoraŭ en frako por pompa bankedo,  
Tempon ne havas alia demeti negliĝon marbordan,

Ĉiuj aĉuloj kunsidas en la Blankadomo, la rabistonesto,  
Kaj de l'ĵurnalistoj tra malantaŭpordo ŝteliras skrupule.  
A. P.<sup>(2)</sup> raportas: vetero malhelpas agadi Usonan armeon.  
U. P.<sup>(2)</sup> raportas: batataj soldatoj sin savas de l'fronto vetkure.

Fiasko hontinda! ho, fiasko hontinda!  
Antaŭ tutmondo la militagentoj  
Jen publikigas la konton de siaj sangkrimoj  
Kun la bankroto de imperiistaj taĉmentoj.

Elĉinigi S. J. Zee.

(1) 'Movado' estas pseŭdonimo de poeto Juan Ŝui-po, kiu naskiĝis 1916 en familio de etbienulo en Suĉou en Kiangsu-Provinco. Lia patro estis estro de vilaĝa elementa lernejo. Li finis sian mezgradan edukon, sed studis nur mallongtempe en universitato pro ekonomia malfacilo. Li komencis verki poemojn post la eksplodo de la Kontraŭ-Japana Milito, kaj eldonis poemojn Popolo, Vintro, Sunfloro, Bolantaj Jaroj, ktp, kaj ankaŭ tradukitan elektitan poemaron Ho Mia Koro en la Alta lando de angla poeto Robert Burns kaj Kolekto de Modernaj Pri-poemaj Traktatoj. En 1946 eldoniĝis per la pseŭdonimo 'Movado' populara poemaro Idilioj de Movado kies enhavo estas politikaj kaj sociaj satiroj. Lasttempe li entreprenis tradukon de moderna Usona poemaro, kiu jam eldoniĝis kaj poemaron dum la Dua Mondmilito, kiu ankoraŭ ne. Ĉijare eldoniĝis de li tradukita poemaro de Ĉilia poeto Pablo Neruda. Nun li redaktas la feliĉetonon Popola Literaturo de Popola Tagĵurnalo.

(2) A. P. (mallongigo de Associated Press) kaj U. P. (mallongigo de United Press) estas du grandaj novaĵo-servoj en Usono.



Kion gajnas MacArthur en la milito

Jie Ĉien-ĵu

## SUR LA PACA FRONTO

Ĉjun

La Pacosubskriba Kampanjo en Ĉinio forte intensiĝis en la mezo de la lasta monato kaj, laŭ nekompleta statistiko, ekde majo ĝis nun, post varbado de tri monatoj, la tuta nombro de subskribintoj jam superis 50,000,000. Post la Tutlanda Pacosemajno de la 1a ĝis la 7a de julio, Tutlanda Kampanja Semajno kontraŭ Usona Agreso en Tajvan kaj Koreio komenciĝis en la 17a de julio. La du Kampanjaj Semajnoj estis intencitaj kunligitaj. La popolo de la tuta lando voĉigas sian subtenon por la defendo de mondopaco kaj kontraŭ la Usonaj militagentoj. Demokrataj organizoj jam faris freŝajn vokojn al la popolo por subskribi la Stokholman Pacaŭ Alvokon. En la nuna alta tajdo de tutlanda indigno kontraŭ la Usona agreso en Tajvan kaj Koreio, estas atendate ke la ĉina popolo levos la tutan nombron de pacaŭ subskriboj ĝis cent milionoj.

Dum la kampanjo de subskribo al tutmonda paca alvoko disvolviĝis en ĉiuj partoj de la lando. Popolanoj de ĉiu klaso ne nur fervore subskribis al la porpaca deklaro, sed ankaŭ grupe aŭ individue skribis siajn opiniojn, el kiuj oni povas aŭdi fortan voĉon de la ĉina popolo por defendi la tutmondan pacaŭ, kaj el kiuj oni povas vidi la konfidon de la ĉina popolo al la fina venko.

La tuta laboristaro kaj funkeiularo de la Jian-Stacio de Tajjuan-Fervoj-administrejo sur la kajero de porpaca subskribo skribis: "Ni forte deziras manpremi kun la defendantoj de paco, malebligi la novan militon fabrikatan ĉefe de Usona imperiismo, kaj batali por konstruado de nova Ĉinio." La laboristoj kaj funkeiuloj de Karbo-minejo en Cinhuangtao skribis: "Ni bezonas demokratian pacaŭ kaj ni decideme kontraŭas la militon invadan." La laboristoj kaj funkeiuloj de la Fabriko de Provizaĵoj de la Centra Popola Registaro diris: "Nia tuta laboristaro kaj funkeiularo firme kontraŭas la uzon de atomaj armiloj kaj la invadan militon de la imperiistoj; ni nepre plenforte batalos por defendi la tutmondan pacaŭ." La tuta laboristaro de privata tinktur-teksejo Juhuasung diris: "En niaj privataj fabrikoj ni devas disvolvi produktadon, kaj ĝisfunde efektiviĝi la politikon de utilo al ambaŭ kapitalistoj kaj laboristoj, kaj ni ankaŭ kontribuos nian forton al la komuna batalo."

Multaj komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, kaj honoraj vunditaj soldatoj post siaj subskriboj elskribis siajn solenajn alvokojn. Kuo Kang en la Militregiona

Hospitalo, al kiu restis nun tri fingroj, subskribis per sia tremanta maldekstra mano, dirante: "Se la imperiistoj kuragas iniciati militon, mi albatalos ilin per mia maldekstra mano." Iu soldato nomata Ĉang Ming diris: "Unu subskribo egalas al unu bajoneto pikanta tra la koro de milit-fabrikanto." Alia nomata Li Ping diris: "Milit-fabrikantoj, ĉie estas pretaj por vi tomboj, vi risku!" Vang Ĉun-pang kaj aliaj, 17 militantoj, skribis: "Ni estas soldatoj de la Popola Liberiga Armeo. Ni decideme subtenas la alvokon de la Mondpaca Kongreso kaj kontraŭas la politikon de invad-milito gvidatan de Usonaj imperiistoj. Se tiuj demonoj kuragas komenci kriman invad-militon, ni firme kontraŭbatalos ĝis nuligo de tiuj ĉi militkrimuloj." Familianoj de soldatoj Ĉen Ĵang, Peng Po-ĵing skribis sur la kajero: "Se iu kuragas fari invadmiliton, kvankam mi jam estas maljuna, mi certe ordonis mian filinon preni armilon kaj decideme defendi la tutmondan pacaŭ. Mi solene deklaras mian decidon."

Virinoj esprimis siajn senkomparan abomenon kontraŭ la invad-milito. Ĉang Zi-ŝiu skribis: "Mi deziras pacaŭ. Mi amas mian edzon, mi amas mian filon. Atom-bombo estas kruela armilo, kiu devas esti tuj malpermesita." Mastrumantino Ĉang King post sia subskribo diris: "Patrinaj en tuta Ĉinio devas subskribi por siaj infanoj al la paca alvoko." Mastrino Li-Ĉang kondukis sian tutan familion subskribi kaj skribi siajn dezirojn: "Ĉiuj el nia familio, ĉu junaj ĉu maljunaj, per nia tuta forto batalos por paco."

La urbano de la grandaj urboj ankaŭ same alvokis por la tutmonda paco, Ĉang Kuan-ĵing skribis: "Se freneza hundo mordas homojn, ni senhezite ĝin mortigos." Ĉeng Ŝiu-ĵu skribis: "Por la infanoj, la estontaj mastroj de nia lando, ni decideme kontraŭas la uzadon de atomaj armiloj fare de la milit-fabrikantoj." Ĉing Ven-haŭ kaj aliaj homoj skribis: "Ni volas per nia tuta forto defendi la tutmondan pacaŭ kaj fiaskigi ĝisfunde la intrigon de la imperiistoj, ke la liberaj kolomboj flugu en la ĉielo kaj la bonuloj vighu sur la granda tero."

La milit-fabrikantoj tremu antaŭ la fortaj voĉoj de la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo; kaj ilia invada projekto subakvigu sub la paca ondo de la ĉina popolo kaj ĉiuj popoloj de la mondo!

Trad: Ĉ. J. Ĉen

# Por Nova Afero, Nova Maniero

Ku Ju

*Pere de vera viveca priskribo pri la kampara vivo kaj kutimo, la aŭtoro elmontras la kontraŭdiron inter novaj kaj malnovaj aferoj, novaj kaj malnovaj ideoj en la malnova liberigita regiono: la malnovaj pereantaj dum la novaj kreskantaj. La aŭtoro estas malmulte konata kampara verkanto. Tiaj verkantoj estas tre multaj en la kamparo kaj liberiga areo de la malnova liberigita regiono. Ili intime rilatiĝas kun la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj kaj bone konas ilian vivon. Iuj el ili estas mem laborist- aŭ kamparan-devenaj. Kvankam ilia lerteco ankoraŭ ne estas sufiĉe matura, tamen en iliaj verkoj ofte montriĝas povo de observo kaj priskribo pri la vivo de la amasoj ne atingebla de iuj verkistoj. Tia povo donas freŝan kaj intiman senton.*

la trad.

Du tagojn antaŭ ol Vang Kuej-teĥ estis translokita al laboro en la distrikta registaro, la patro de Feng-lan unu flanke kaj la patrino de Kuej-teĥ aliflanke, travidinte la penson de siaj filino kaj filo, volis tuj okazigi la geedziĝon.

Vang Kuej-teĥ ja estis junulo viveca kaj vigla kiel drako kaj tigro, dum la knabino, nomita Feng-lan, estis penema kaj kapabla modelo de produktado. Ilia fianciĝo ja aplaudis kaj ofte priparolis ĉiuj najbaraj vilaĝanoj. Krome, kvankam ili loĝis en du vilaĝoj, tamen la nura baro estis rivereto kaj kiam sekigis la rivereto, la du vilaĝoj kvazaŭ fariĝis unu. Vang Kuej-teĥ ofte vizitis Feng-lan pro aferoj. Tion vidante la maljunaj virinoj babilis post ilia dorso: "Estas nova afero, ke gefianĉoj ofte kune laboras!"

La patro de Feng-lan okupis sin nur en kalkulado, kiom da greno li vendos kaj kiam doton li aĉetos por sia filino. Iun tagon li frumatene ellitis, ligis kelkajn sakojn da greno sur sian karecon<sup>(1)</sup>, preta por iri post matenmanĝo al la foirejo en la urbo.

Kiam li ekiris, la filino lin haltigis.

"Paĉjo, kion vi faras? Estis malfacile rezervi tiomete da greno ĉijare. Ĉu la vilaĝa kunveno ne decidis, ke antaŭ tritikrikolto ĉiu el ni devas rezervi 3 ĝis 5 buŝelojn (1 ĉina buŝelo = 1 dekalitro) da greno?"

Lasinte la kare-timonojn, la patro diris, plenigante sian pipon:

"Feng-lan, ekde kiam vi povis labori, vi ja multe faris por nia familio ĉi tiujn jarojn.....paĉjo ne povas fari al vi maljuston....." La patro haltas pro emocio kaj post du entiroj de fumo li daŭrigas: "Mi intencas aĉeti por vi kvar kompletojn da vestoj, du el serĝo kaj du el katuno.....duonan kompletan da mebloj, kaj iom da kruĉo kaj taso, spegulo, pudrujo kaj sapujo. Kiel vi opinias? Ĉu tio estas laŭ via gusto?"

Apenaŭ elakultinte Feng-lan ekridis, kaj ridante ŝi elkareigas la sakojn. Al la perpleksigita patro ŝi klarigis:

"Paĉjo, ĉu Kuej-teĥ ne diris al ni, ke ni ne elspezu unu plian moneron ol kio estas necesa? Ĉar en la nuna tempo, post liberigo, kiu ne havas ŝrankojn kaj kestojn? Kiam utilon donos multe da tiaj aĵoj? Per ili ni ja ne povas kulturi la teron aŭ tiri la plugilon. Kaj kiaokaze mi surmetos tiajn flordesignitajn vestojn? Nun ja ne estas kiel antaŭe, kiam novedzinoj ne laboris en la kampo dum tri jaroj. Alveninte al ilia hejmo mi devos tuj iri kulturi en la kampo. Kiu havos tempon por sin ornamu per pudro kaj ŝminko?"

Kuej-teĥ estas distrikta kadro kaj kompreneble li des pli malŝatos tion. Paĉjo, ne plu klopodu pri tio."

Malŝarginte la karecon, Feng-lan vendos sian grenon por aĉeti doton, kio okazos al li en la venonta printempo?

pajlobudon. La patro, sidante sur ŝtupo antaŭ la domo, ankoraŭ pripensadis kun kuntiritaj brovoj kaj klinita kapo.

Kiam Feng-lan elvenis el la budo, la patro diris:

"Nu, ni vendu ne la grenon, sed la bovidon. Ni ja ne povas nutri du brutojn....."

"Ni des pli ne devas vendi la bovidon! Ekde ĝia naskiĝo mi estas ĝin fleginta, pasis jam pli ol unu jaro, kaj baldaŭ ĝi uzeblas. Kiel ni povas ĝin vendi? Ĉe Kuej-teĥ ne estas bruto, estos malfacile por mi labori en la kampo kiam mi iros al ilia hejmo. De kiu mi prunteprenu?"

La patro ne povis venki la filinon per argumento. Kvankam li timis ke tiuj observantaj malnovajn morojn ridos je li, se li faros laŭ la volo de la filino, tamen li ne sciis kion pli bonan li povos fari.

\* \* \* \* \*

La naŭa de decembro estis ilia geedziĝa tago. Tuj post la unufoja kokokrio jam leviĝis la patrino de Kuej-teĥ. Butonante kaj kolerante ŝi palpis al la nova ĉambro por la novegedzoj kaj abrupte kriis al la filo, "Leviĝu! Kia plezuro estas dormi en ĉi tia malplena ĉambro, el kiu kvazaŭ oni ĵus elportis la ĉerkon!"

Duonvekiĝinte, Kuej-teĥ ne sciis kio estas la afero, kaj la patrino eksidiĝis sur la rando de la terlito bruspirante.

Viŝante al si la okulojn Kuej-teĥ leviĝis sur la lito:

"Panjo, ankoraŭ ne tagiĝas, kial tiel frue ellitiĝi?"

"Tiel frue? Ĉu mi povas trankvile dormi? Ĉu estas iomete da geedziĝa atmosfero en nia hejmo?"

Kuej-teĥ klarigis al la patrino:

"Panjo, ĉu vi malkontentiĝas pro manko de flordesignita palankeno por la novedzino? Nu, en la nuna tempo kiu ankoraŭ sidas en palankeno! Krome, niaj samvilaĝanoj sin okupas hejme kaj ekstere je flanka okupo, kiu havas tempon por helpi nin! Cetere, kiam la popolanoj jam ne sidas en palankeno, ĉu mi, estante kadro, ankoraŭ obstinas en tia feŭda sensenca aĵo?"

La patrino kolere batadis la litmaton, ke polvo elflugis de sub la mato:

"Kion vi diras! Via patrino ne estas tia stulta ŝtipo. Edziĝi sen palankeno ja estas nuna kutimo. Tion mi ankaŭ aprobas. Mi nur ne komprenas, ĉu ŝi ĉe neniam da doto havas, kiam ili vivas en tia komforto? Kiam mi edziĝis, via avino, ja vendis ĉion vendeblan por aĉeti kestegon por mi...."

La patrino malfacile spiris pro kolerio. Vidante tion la filo ne sciis kion diri. Li povis nur afable ŝin konsoli:

"Panjo, se la patro de Feng-lan vendos sian grenon por aĉeti doton, kio okazos al li en la venonta printempo?"

Surda al sia filo la patrino daŭre grumblis, disŝprucante saliverojn sur la vizagon de sia filo.

"Ĉe ion grandan kiel fingropinto ili domagas kaj ne volas doni. Hieraŭ meztage, knabinegoj kaj junaj virinoj venis por vidi la noveambron. Pro honto la vizago de via patrino ruĝiĝis kiel ruĝa ŝtofo..... Kvankam mi naskiĝis en malriĉa familio, mi ja ne kutimiĝas al ĉi tio!"

La filo ankoraŭ tenis sin pacience:

"Ne plu arangu novan aferon laŭ malnova kutimo. Ekzemple, ĉe bovrurono ni ne havas, ĉe se ni metos ĉi tie du grandajn meblojn ruĝe lakitajn, ĉu ni povos tiri plugilon kaj kulturi teron per ili?"

La patrino ankoraŭ ne estis konvinkita kaj daŭre kriacis plenvoĉe al la filo:

"Vi nur parolas pri produktado! Ĉu mi ne komprenas produktadon, travivinte duonan de mia vivo? Produkti kompreneble ni devas, tamen ĉu ni tute ne zorgas pri prestiĝo? Edziĝo ja estas la plej granda evento en la tuta vivo!"

Kuej-teĥ sin vestis kaj lavis al si la vizagon. Jam tute tagiĝis.

"Panjo, en la nuna tempo nur riĉiĝo per produktado estas honoro. Alia tempo, aliaj moroj! Ne estos malfrue aĉeti tiajn aĵojn estonte, kiam ni riĉiĝos!"

Tion aŭdinte, la patrino des pli koleris:

"Stultulo! Post kiam venis la novedzino, ĉu ili ankoraŭ aĉetos por ni?"

La daŭra kriado de la patrino iom malfaciligis la filon, kaj li ankaŭ laŭte kriis:

"Mi ja edziĝos kun ŝia persono, ne ŝia havaĵo!"

Tion ĝuste tuŝis la malfortan punkton de la patrino, kaj kolere ŝi diris al Kuej-teĥ:

"Nu, vi restu hejme. Mi ne akompanos vin en tia humileco. Mi iros al via avino por tagoj da distriĝo!"

Tion dirante ŝi eliris, karambolante ĝuste en la sinon de la vilaĝestro, kiu ĵus envenis de ekstere. Kun ruloj de gratulaj duversoj<sup>(2)</sup> en mano li venis por pretigi la ceremoniejon. Aŭdinte la kverelon inter la patrino kaj la filo, li envenis por vidi. Vidante la koleran vizagon de la maljunulino, li pride-mandis la kialon kaj klarigante kaj persvadante, ridete diris:

"Onjo, vi miskalkulis! Ekzemple, se estas du knabinoj, unu el kiuj havas ŝrankojn, kestojn, litkovrilojn kaj kusenojn kiel doton sed ne povas labori; dum la alia havas nenion krom du manoj laborkapablaj, kiun el ili vi elektas kiel edzinon por via filo?"

Vidinte ke la patrino iom senkoleriĝis, Kuej-teĥ ankaŭ demandis: "Kiun vi elektas kiel vian bofilinon?"

Ridis la patrino: "Kamparanoj kompreneble ŝatas tiun laborkapablan!"



Post la matenmanĝo la geedziĝa ceremonio estis bele aranĝita, dekore de multe da interesaj gratulaj duversoj, kun la portreto de Mao Zetung en la mezo. Ankaŭ estis donacoj de la distrikta registaro. Dense ĉirkaŭiĝis la vilaĝanoj kaj rigardante tien kaj ĉi tien sentis ke la du okuloj ne sufiĉas por vidi ĉion. Oni ne scias, pri kio la junuloj kaj junulinoj interbabilas.

Iu virino iris tien kaj reen inter la homamaso, demandante: "Ha! Ĉiuj diras ke ili ofte vidas la knabinon Feng-lan, kial mi neniam sin vidis? Ja estas bona ĉi tiu simpla geedziĝo. Kiam mi edziĝis, mi tuj kapturniĝis eksidiĝante en la palankeno. Tio estis elspezi monon por aĉeti suferon! Kiel bone estas nun, unuflanke mono ŝparita kaj aliflanke honoro ĝuata!"

Iu babileme demandis la patrinon de Kuej-teĥ: "Ĉu, kial la doto de la novedzino ankoraŭ ne estas metita ĉi tie?"

La patrino ruĝiĝis, ne povis trovi vorton por respondi kaj rifugiĝis kun honto.

La vilaĝa muzikistaro ekludis siajn instrumentojn. Komenciĝis la edziĝa ceremonio.

Kiam la vilaĝestro anoncis la komencon de la ceremonio, homoj svarmis kiel abelaro. Estis malfacile por la prezidanto de la virina asocio enkonduki Feng-lan tra la amaso. En helblua supervesto kaj malhelverda vatita pantalone, kun flordesignita viŝtuko ligita sur la kapo, sidis grandokula kaj gajvizaĝa Feng-lan apud Kuej-teĥ. Junuloj autiaŭen puŝiĝis per sia tuta forto por pli proksima vido, kaj infanoj fajfe kriis. La vilaĝestro laŭtigis sian voĉon:

"Samvilaĝanoj, bonvole silentiĝu, nun ni komencas la ceremonion. Permesu ke mi unue ion diru. Kuej-teĥ kaj Feng-lan memvole elektis unu la alian! Ili laboradis kune. Unu estimas la kapablon de la alia, kaj pro tio ili fianĉiĝis. Ekzemple, Feng-lan, pri kiu ni ofte aŭdas, estas kapablulo en produktado. Por respondi al la alvoko por ŝparemo kaj produktado ŝi ne senutiĝas aĉetis doton.."

(Daŭrigita sur p. 8)



## TIENZINAJ LABORISTOJ PAROLAS PRI PREZO-STABILIGO

Respondante al la demando "Kion prezostabiligo signifas al vi?" Tienzinaj laboristoj, okaze intervjuate de ĵurnalistoj, interese klarigis la ŝanĝitajn kondiĉojn en tiu urbo depost kiam la Centra Popola Registaro sukcesis ĉesigi inflacion kaj establi stabilan merkaton ekde la komenco de marto ĉijara.

"Antaŭ la liberigo de Tienzin," diris F-ino Kaŭ Ŝu-ji, 23-jara laboristino en teksejo, "mi kutime ricevis pezan ŝarĝon da monbileto je paga tago, sed per la tuta sumo, mi povis aĉeti nur du sakojn da faruno. En tiuj inkub-sorĝaj tagoj, mi devis elspezi ĉiom je la momento kiam mi ĝin ricevis. Eĉ kelktaga prokrasto signifis teruran perdono."

"Ŝi daŭrigis sian parolon, priskribante la nuntempajn kondiĉojn. "Mi ne bezonas rapide kaj blinde aĉeti aĵojn je la paga tago nun. Multaj laboristoj en nia teksejo ĉe povas deponi parton el sia salajro en ŝpar-fakon de la kooperativo. Oni pensus nin frenezajn, se ni estus farintaj tion en la pasinteco."

Fan Paŭ-ŝan, ŝtal-laboristo kaj patro de kvin infanoj, diris jene, "Stabiligo de prezoj donas al mi pli multe da ĝojo ol naskigo de sana budo en la familio. Mi estis ofte duon-malsataj, kun maizo-faruno kiel nia sola nutraĵo. Nun ni havas sufiĉe por manĝi kaj sin vesti."

Iu veturigisto de trirada-pedalĉaro rakontis, kiel li kutime kunportis sakon antaŭe, por ke li povu tuj sin enigi en linion por aĉeti maizo-farunon kiam ajn li gajnis iom da mono. "Nun la sako estas ne plu bezonata," li diris, "mi nenion perdas en la konservado de miaj gajnoj en mono, ĉar la prezoj ne plu altiĝas." Lia juna filo, kiu sub la Kuomintang-regimo serĉis el la ruĝeja utiligebloj, nuntempe vizitas lernejon. Li konstante ĉagreniĝis ĝismorte en la pasintaj tagoj kiel teni sian familion viva, sed nun li regule aĉetas ekzempleron da nova ĵurnalo, "Transportisto."

Aŭskultu voĉon el Popola Ĉinio de la

## PEKINA RADIO!

Ĝi disaŭdigas ĉiutage programojn en lingvo

Korea 9.30-10.00 GMT

je la ondolongoj kaj frekvencoj:

|       |        |      |            |
|-------|--------|------|------------|
| 468.7 | metroj | 640  | kilocikloj |
| 49.1  | metroj | 6100 | kilocikloj |
| 42.2  | metroj | 7100 | kilocikloj |
| 40.0  | metroj | 7500 | kilocikloj |

kaj en lingvoj:

|           |               |     |
|-----------|---------------|-----|
| Japania   | 10.00 - 10.30 | GMT |
| Indonezia | 10.30 - 11.00 | GMT |
| Vietnama  | 12.00 - 12.30 | GMT |
| Angla     | 13.30 - 14.00 | GMT |
| Siana     | 14.00 - 14.30 | GMT |
| Birma     | 15.00 - 15.30 | GMT |

je la ondolongoj kaj frekvencoj:

|        |        |        |            |
|--------|--------|--------|------------|
| 428.57 | metroj | 700    | kilocikloj |
| 29.24  | metroj | 10,260 | kilocikloj |
| 19.92  | metroj | 15,060 | kilocikloj |

Skribu al la Radiostacio pri viaj impresoj de la enhavo kaj pri la aŭdebleco de la disaŭdigo!

La signifon de sekureco kiun alportis la prezo-stabiligo, bone komprenas ankaŭ registaraj laborantoj, komizoj instruistoj kaj ceteraj. Ekzemple, F-ino Ĉia, instruistino en elementa lernejo, esprimis sian opinion kiel jene: "Ni instruistoj eluzis pli da tempo en pripensado kiel kovri la elspezon ol kiel prepari niajn lecionojn. Nun ni havas tempon elpensi plibonajn instrumentojn."

Samajn opiniojn ankaŭ havas la Tienzinaj komercistoj kaj industriistoj. Ekzemple, la administranto de Pejĵang-Teksejo asertis: "Stabila merkato kaŭzis ŝanĝojn en fabrika administrado."



La laboristinoj en Tienzina Ŝpino diskutas kiel plenumi la produktan taskon

## Por Nova Afero.....

(daŭrigo de p. 7)

Tiam denove tumultigis la ĉeestantoj, kaj diris junuloj:

"La novedzino parolu, kiel ŝi elektis al si sian viron, ĝuste kiel ŝi estis amindumata!"

En la mezo de la bruado, aŭdigis krio deekstere: "Venis Ĉĉjo Lokaj!"

Rigardante eksteren, oni vidis maljunuleton ĉirkaŭ 40-jara, kun nigra liphararo, kaj rekonis en li la vilaĝestron de la vilaĝo de Feng-lan. Li kondukis bovidon per unu mano kaj en la alia tenis vipeton. Rapide ekstaris Kuej-teh, petis lin sidiĝi kaj diris:

"Kial vi alkondukis bovidon?"

"Ĝi estas ja la doto de Feng-lan!" diris maljuna Lokaj ridante.

"Onjo," kriis ekscite la vilaĝestro al la domo, "elvenu por vidi, rapidu, la familio de la novedzino alsendis bonan doton?"

Grandpaŝe elkuris la patrino. Vidante nekonatan kun glathara kaj grasdika bovido, ŝi ne komprenis, kio okazas.

"Ĝi estas bovido de la patro de Feng-lan. Li donas la bovidon al vi kiel doton de sia filino...."

Neniam havinte bruton dum sia vivo, la patrino tiel ĝojis, ke ŝi ne sciis kion diri. Ŝi etendis sian manon por karesi la kapon de la bovido. Kaj la bovido, kun flavaj vilaj haroj kaj blanka frunto, svingante la voston kaj eligante la langon, tion kaj ĉi tion lekadis, hufbatadis la teron. Ĝi aspektis laborkapabla kaj tiel aminda! Kun malferma sendenta buŝo la patrino nur ridis. Post longa tempo ŝi elpremris:

"La filo ne laboras hejme, kaj mi neniam nutris bruton. Tio ja estos malfacilaĵo por mi!"

Eksplodis ridego. La vilaĝestro diris:

"La filo ne laboras hejme, kaj mi neniam nutris bruton. Tio ja estos malfacilaĵo por mi!"

Eksplodis ridego. La vilaĝestro diris:

Antaŭe ni industriistoj estis pli prizorgemaj pri la fluktuado de prezoj ol pri la efektiva funkciigo de niaj fabrikoj. Nia ĉiutaga cerbumado estis akiri kaj vendi niajn varojn plej profitodone en tia necerta merkato, ĉar la plej malgranda malkalkulo signifis ofte terurajn perdojn por ni. Tia stato jam ne plu ekzistas. Stabilaj prezoj alportis stabilecon al nia industrio."

La solaj personoj kiuj ne tiel ĝojas en Tienzin, ŝajnas esti la akaparistoj kaj spekulaciistoj, kiuj bone prosperis en la pasinteco el la fluktuado de la merkato. Ilia "ora epoko" jam pasis, kaj pasis por ĉiam.

Tradukis Pandiŝo

EN OKTOBRO venos solena festo al la ĉina popolo, ĉar en la unua de tiu monato lastjare fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko. Ekde tiam Ĉinio, enhavanta 475,000,000 popolarojn, liberiĝas el la subpremo de imperismo, feŭdalismo kaj burokratismo. Tio havas grandan signifon por la liberiĝo de la subjugaĵaj popoloj en Azio kaj la tutmonda homaro. Kun ĝojego ni atentigas niajn samideanojn, ke esprimu ankaŭ vian ĝojon per amasoj da salut-leteroj al nia Centra Popola Registaro!

La Red.

## EL LA REDAKCIO

LASTTEMPE ni ricevis multe da leteroj de niaj legantoj. Iliajn dezirojn ni laŭeble kontentigas, sed ni ne povas ĉiujn respondi aparte. Pardonon ni petas pro tio.

KELKAJ legantoj skribis tre malklare siajn nomojn kaj adresojn en sia letero al ni. Tio donas al ni grandan malfacilon. Tial ni petas, ke la nomoj kaj adresoj skribu nepre klare kaj preslitere. Ne tion forgesu, samideanoj, kiam vi al ni skribos!

## Jen Vokoj al Vi!

\* Aleksandro Petruov, "Boris I" 60-Sofio, Bulgario. 22j. dez. kor. kun ĉin(in)oj pri politiko, filozofio kaj ekonomio.

\* Nobuki Naosuke, Karube Kijonemura Cukubogun, Okajama, Japanio. dez. kor. kun ĉinoj.

\* Stefan Dabkov, G. Dimitrov 56, Trevna, Bulgario. dez. kor. kun ĉinaj junuloj.

\* Enache Virgil, Mitropoliei Nr. 27. (1 MAI) Sibiu, Romania. dez. kor. kun la tutmondo per lingvoj esperanta, franca, hispana.

\* Kurt Elias volas kor. kun ĉinaj esp-istoj por interŝanĝi fotojn, ilustr. p.k. Adresu al: Kurt Elias, Leipzig W 35 Philipp-Reis-Strasse 81, Germanio (Rusa Zono).

## ABONMANIERO

- 1 Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas daŭre ricevi nian gazeton, volu pagi laŭ la tarifo.
- 2 Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-gazetoj ni volonte interŝanĝos reciproke periodaĵojn aŭ librojn.
- 3 Respond-kuponon ni ankaŭ akceptos kondiĉe ke inter tiu lando kaj Popola Ĉinio starigas jam diplomatia rilato.

## Abontarifo

| Por legantoj en  | Prezo de    |
|------------------|-------------|
| U S S R kaj      | 12 numeroj  |
| Orienta Eŭropo   | 6 rubloj    |
| Britio           | 6 ŝilingoj  |
| Hongkong kaj     | HK \$6.00   |
| Sudmaraj Insuloj | 6.50 kronoj |
| Svedio           | US \$1.25   |
| Usono kaj        |             |
| Kanado           |             |

Rim. 1 Sendkosten inkluzive, rekomen-

don ekskluzive.

2 Legantoj en ceteraj landoj povas aboni laŭ prezo por Usono.

國內定價：每期基價一元五角，全年十二期，基價十八元，郵費在內，掛號郵費另加